Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵa Letero de **Federacio de Aŭstraliaj Esperantistoj**

NI SENDAS AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KUN KONATA RETADRESO

http://beta.visl.sdu.dk/lingvohelpilo/

auto 15/01/2013 Naŭdek kvara Eldono 2012 18/01/2013 SENDITA

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rspring@tpg.com.au;

Provlegita de Nicole Else

La informa kaj noma paĝoj nur aperos en la dekaj eldonoj

GRAVAJ DATOJ vidu Tamen Plu redaktas Katarina Taggart

Se vi ne ricevas Tamen Plu aŭ 'Aŭstraliaj Esperantistoj', aŭ ricevas dufoje, informu AE.


Skribu, informu 200 retadresaranojn de AE pri viaj novaĵoj

Vi apartenas al la Esperanta Familio de Aŭstralio. Skribu


ALKLAKU la hiperligilojn markitajn tiel

Lingvo

Esperanto-RetRadioj.



Mi estas aŭskultanto de tiel nomataj Esperanto-RetRadioj. Mi aŭskultas regule nian E-RetRadion kaj la Polan RetRadion. Liberatempe danke al speciala paĝo http://esperanto-radio.com/ mi facile kaptas kelkajn aliajn podkastojn, inter ili estas: Radio Vatikano, 3ZZZ, Varsovia Vento, Radio Havano Kubo kaj la Kaliningrada E-radio.



Sur la paĝo troviĝas ankaŭ radio Muzaiko, kiu elsendas tutdiurne siajn variajn programerojn.

Andreo Bach el Gdynia en Pollando

AŬSKULTU, LEGU ESPERANTAN RETRADION TAGE



Informaj rakontetoj, Bona lingvo, Malmultaj minutoj. Plibonigu vian Esperanton

http://members.aon.at/aldone/peranto/index.html

3ZZZ

En Melburno vi povas aŭskulti lundon de la 1a ĝis la 2a ptm je 92.3 FM



De ie ajn en la mondo eblas aŭskulti dum la semajno kiam la programo estis elsendita je 3zzz.com.au aŭ iam ajn en la arkivigejo www.melburno.org.au. Aŭdeblas la voĉo de Alan Bishop, Karl Egger, Laszlo Farkas, Franciska Toubale kaj de multaj intervjuitoj

Kontaktu 3zzzesperanto@gmail.com

Kelkaj relative novaj elsendoj ne estas nun aŭskulteblaj en la arkivo (Nicole)

Fabeloj Ilustritaj Dornprincino

http://w.kunlaboro.pro.br/esperanto/fabeloj/

KLUBNOVAĴO






Informas la aktivaj kluboj kaj grupoj

La kluba listo kreskas





Ĉu via klubo/grupo kunvenis? as? os?

Maldetala informo sufiĉas. Kiuj ĉeestis? . rspring@tpg.com.au

Ĉu ĉiu en via grupo ricevas la Novaĵleteron?



Central Coast Esperanto Club

kunvenis Sab 2ptm 12a jan 2012 Bamboo Buddha Café
221 Wattle Tree Road, Holgate NSW 2250



La Brisbana Esperanto-Societo

Ni nun havas Facebook paĝon kaj ankaŭ, ni estas ĉe
www.meetup.com/Brisbane-Esperanto-Society/
Kay Anderson



La Tasmania Esperanta Societo

kunvenas, ĉiun jaŭdon je la Metz trinkejo, Sandy Bay.
Je la 7-a ĝis 8:30 ĉe Metz kaj poste ni kutime kune vespermanĝas...
Roberto Budzul



La Melburna Esperanto Klubo

La Melburna Esperanto Klubo renkontiĝis ĉe Ross House je 6.30 ptm lunde.

" **Melburno Esperanto-Klubanonco.**

Kiel kutime, la Melburna Esperanto-Klubo ne renkontiĝas post la Zamenhofa Festo ĝis la 14a januaro 2013.

Ni petas Melburnajn Esperantistojn ĉeesti tiun kunvenon por helpi kun la Bonvena Kongreso!
Dankon, Heather Heldzingen"



Esperanto Kafo Klubo de Kanbero

kunsidas ĉiujn vendredojn je la 5a ptm en Cafe Fontaine kiu troviĝas en la plej supra nivelo de la Canberra Centre.



La Manlia Esperanto-Klubo Ĉiuj bonvenaj.

Unu taso da senpaga kafo Bavarian Beer Cafe, Manly Wharf;
Manlio kunvenos la 19an de Januaro.



Esperanto-Domo Sidnejo

BBQ lastaj dimanĉoj de la monato
(Kunvenos 27 januaro 2013)
Ĉiuj bonvenaj



Torkio Esperanto Kafo Klubo - Viktorio

La Torkio grupo konsistas de lokaj loĝantoj kaj vizitantoj de Melburno.
Ni celas esti amikaj kaj agrablaj, kaj plibonigi nian esperantan kapablon.
Ni babilas pri kaj per Esperanto - kaj ni trinkas kafon!
tel 03 5261 2899 M 0421043272
https://sites.google.com/site/torquayesperantoweb/

Aŭstralia Esperanto Asocio

ACN 121 495 789 C/- G.P.O. Box 2122, Melbourne 3001
Melburna Kongreso: vidu AE91 heather@melburno.org.au

Goodwill Congress– 17 to 21 January 2013



La Adelajda Esperanto-klubo-


kunvenas la unuan merkredon de ĉiu monato (krom januaro) en Box Factory, Regent Street South. Kontakto: Bob Felby (08) 8242 1460.
Zamenhof-tago en decembro (11 esperantistoj).

ADELAJDA ESPEREJO

Legogrupo. En la Ŝtata biblioteko kunvenadas ĉiun ĵaŭdon
Max Wearing <mwearing@internode.on.net> tel (08) 8359-3375

Informo

Sydney Language Festival 2013




La NSK federacio havas agadplanojn por venonta jaro. Ni organizos lingvan festivalon en majo en la Internacia domo de la universitato de Sidnejo. Kaj mi jam komencis krei la retejon por tiu evento, Amike, Nicole vidu: http://esperantowebdesign.com/sydneylanguagefestival/

Ĉu $241,600 aŭ pli? uzis AEA dum 7 jaroj 2005-2012 Ĉu oni forgesas?

LETEROJ de la legantoj

Taŭga desegno aŭ foto, ne necesa, sed bonvena





Nuntempe mi partoprenas la N.Z. kongreson. Mi ĝuas ĝin, ĉar mi ne respondecas. Sandor

ARMIDALE



Terry Manley kaj Ron Gates renkontiĝis en la urbocentro de Armidalo Sabaton 12an de Januaro. Ĉu la unua renkontiĝo de nova Armidala Esperanto-Klubo? Fakte la renkontiĝo celis diskuti la ne ankoraŭ eldonitan libron de Ron "Briĝo kun Veneno".



Sed ankaŭ estis okazo festi la 90an datrevenon de la naskiĝo de Ron, kiu okazis je la 8a de Januaro. Gratulon al li!

Ron Gates



Post la renkontiĝo Ron iris ricevi gratulon de la Briĝa Klubo pro venko en konkurso pasintan Novembron. Li kaj lia kunludanto, kun kiu li neniam antaŭe ludis, venkis 56 aliajn duopojn en tut-taga briĝa konkurso. Kaj la mirinda fakto estis ke ili nur estis rezerva paro por la konkurso! Duoblan gratulon al li.

amike Terry Manley

PLUS NOTO PRI LA KONGRESO

Mi bedaŭras ke mi ne povas ĉeesti la Bonvolan Kongreson de AEA en Melburno. Sed mi deziras al la ĉeestantoj Bonvolan kaj Sukcesan Kongreson kaj atendas informon pri tio. Se de distanco mi povas iel helpi bv kontaktu min. teren2012@gmail.com Terry



Jonathan Cooper, kiu dum 30 jaroj laboris en la Artgalerio de Novsudkimrujo, prelegos en Esperanto pri "Moderna arto: kio ĝi estas kaj de kie ĝi venis?"

La prelego reokazos dum la Melburna Kongreso venontan vendredon je la 09.00atm

Melburna Kongreso: 17/01 – 21/01/2013

Jaûdo, 17-01-2013

14:00 – 20:00 Registrado
18:30 – 22:00 Komuna vespermanĝo & Interkona vespero

Vendredo, 18-01-2013

07:30 - 08:30 Matenmanĝo
09:00 - 12:30 Esperanto Kurso (Trevor Steele)
09:00 - 17:00 Ordigo de la AEA arĥivoj (Katja Steele, Huigh Malcolm)
09:00 - 10:30 Malfermo
Moderna Arto (Jonathan Cooper)
10:30 – 11:00 Kafopaŭzo
11:00 - 12:30 Kongresa temo: Bonvola Kongreso.
Kiel rekrei pozitivan etoson en AEA.
La estonteco de AEA.
Bonvolu kontribui viajn ideojn, revojn kaj pensojn
12:30 - 13:30 Tagmanĝo
13:30 – 15:00 La valoro de niaj arĥivoj (Katja Steele, Barrie Cledsmith, Huigh Malcolm)
15:00 – 15:30 Kafopaŭzo
15:30 – 16:30 Ŝanĝiĝo de la klimato - kion ni faru? (Jennifer Bishop)
16:30 – 17:00 Kartludo/Miaj libroj (Trevor Steele)
17:30 - 18:00 Raporto de la arĥivistoj
18:15 - 19:00 Vespermanĝo
19:00 - 22:00 Kvizo (Susan & Trevor Holton)
Debato (Daniel Kane)

Kulturbingo (Nicole Else)

Sabato, 19-01–2013

07:30 - 08:30 Matenmanĝo
09:00 - 12:30 Esperanto Kurso (Trevor Steele)
09:00 - 17:00 Ordigo de la AEA arĥivoj (Katja Steele, Huigh Malcolm, Barrie Cledsmith)
09:00 - 09:45 Hazel Green prezentas *edukado.net* kaj aliajn pozitivaĵojn en Esperantujo
09:45 – 10:30 Mondeto. Helpu enkonduki Esperanton en niaj lernejoj. (Penny Vos)
10:30 – 11:00 Kafopaŭzo
11:00 - 12:30 Individuaj prezentadoj
Indrani: *Identeco*, Pat Palmer: *Mia libro*, Mary Mills: *Mia familio*, Vi ?
12:30 - 13:30 Tagmanĝo
13:30 – 18:00 Ekskurso
18:30 - 22:00 Bankedo (Honorigoj, Aŭkcio, Pozitivaĵoj)

Dimanĉo, 20-01–2013

07:30 - 08:30 Matenmanĝo
09:00 - 12:30 Esperanto Kurso (Trevor Steele)
09:00 - 17:00 Ordigo de la AEA arĥivoj (Katja Steele, Huigh Malcolm)
09:00 – 09:45 Ekiĝo, kresko, kaj celoj de la novaĵletero (Roger Springer)
09:45 - 10:30 La simia reĝo (Daniel Kane)
10:30 – 11:00 Kafopaŭzo
11:00 - 12:30 Nia nova retejo (Jim Radford)
12:30 - 13:30 Tagmanĝo
13:30 – 14:00 Naturo en Aŭstralio
*** Dezertaj grundoj(Arid Lands) en Aŭstralio (Helen Palmer)**
*** Birdoj en mia ĝardeno (Paul Green)**
14:00 – 15:00 Taksante ĵazon kiel muzikon (Alan Bishop)
15:00 – 15:30 Kafopaŭzo
15:30 – 16:00 Miaj Filmoj (Nicole Else)

16:00 – 17:00 Film Festivaloj/Konkursoj (Rainer Kurz)
18:30 - 22:00 Adiaŭa vespero – Prezentadoj de diversaj grupoj/homoj

Lundo, 20-01–2013

07:30 - 08:30 Matenmanĝo
Forvojaĝo

